

Radio Ĉerizo 8
2011-02-10

Radio Ĉerizo hodiaŭ kondolencas la ŝipon “Ehime-maru”.

Hodiaŭ, ĝuste antaŭ 10(dek) jaroj, en la jaro 2001(dumil unu), februaro la 10(deka)-an, je la 8(ok)-a kaj 45(kvardek kvin) minutoj en japana tempo, alfundiĝis, pereis la trejna ŝipo “Ehime-maru” en maron, kun studentoj kaj instruistoj, per subite surmariĝinta usona submarŝipo “Grinvido”, apud la insulo Oahu de havaja insularo. La atakita ŝipo “Ehime-maru” ricevis gravan vundon, kaj ĝia korpo kurbiĝis kiel litero V(vo), kaj per la ekflapo 26 (dudek ses) surbordiĝintoj forĵetiĝis sur maron, kun 12(dek du) vunditoj. Tuj post la krakego ĝi submariĝis nur en 5(kvin) minutoj kun 4(kvar) studentoj kaj 5(kvin) instruistoj en ĝi. Oni trovis la ŝipon sub la maro 600(sescent) m.(metrojn) profunde en oktobro samjara.

“Ehime-maru” estis la trejna ŝipo de meza altlernejo de Uvaĵima, gubernio Ehime. Ĝi forvojaĝis por fiŝkapto-trejnado apud Havajo, kaj alfrontis senatenditan katastrofon. La kaŭzo de la akcidento estis raportita, ke la kapitano de la submarŝipo ne bone atentis la marsurfacon, okupite al regalo al civitanoj por montri bonan funkcion de la ŝipo.

Poste la monumento estis fondita en parko de Honolulo, Oahu, Havajo. En Japanio lernejestroj fondis la tagon, la 10-an de februaro, kiel “la tago de mara sekuro”.

Nun trejna ŝipo de nia lernejo ekzercadas fiŝkapton apud Havajo, kaj post la fino de trejnado, studentoj iros al la parko, por dediĉi florojn, preĝante al la viktimoj de la akcidento. Ankro tie havas 9(naŭ) ĉenojn, montrante nombron de la forpasintoj. Kaj ĉiuj studentoj kaj instruistoj de nia lernejo, Kagoŝimo, preĝis dum minuto hodiaŭ matene.

Retadreso de fotoĵo de la ŝipo sub maro estas metita en la dosiero. Bonvole referencu ĝin.

Radio Ĉerizo hodiaŭ sciigis la korŝiran eventon, okazintaĵon antaŭ 10(dek) jaroj. El la suda Japanio raportis Belmonto. Ĝis reaŭdo!

*Propraj nomoj:

Ehime-maru Ehime-maru

えひめ丸 えひめまる

“maru” estas ofte aldonita kiel finaĵo de ŝipnomo

Uvaĵima Uwazima

宇和島 うわじま

Grinvido Greenville

*Korektoj:

lernejestroj

ne aŭdebla

ekzercadas

sonas kvazaŭ s

“Ehime-maru” sub maro.

<http://ja.wikipedia.org/wiki/>

[%E3%83%95%E3%82%A1%E3%82%A4](http://ja.wikipedia.org/wiki/%E3%83%95%E3%82%A1%E3%82%A4%E3%83%AB:Ehime_Maru_divers.jpg)

[%E3%83%AB:Ehime_Maru_divers.jpg](http://ja.wikipedia.org/wiki/%E3%83%AB:Ehime_Maru_divers.jpg)